





junio 1970
63-a jaro
n-ro 775 (6)

esperanto

oficiala organo de
universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 - rotterdam-3002 - nederlando - redaktoro: v. sadler



**Al Ekspo '70:
helpe de la
Internacia Lingvo**

Vi trovos

niajn juniajn paĝojn iom dense ŝtopitaj. Pro la ĝenerala intereso de la ĉi-monata Lerneja Bulteno (normale 2-paĝa), ni permesis al ĝi iom da ekspansio. Konsekvence, aliaj rubrikoj devis aspiri pli-olkutiman koncizon. Alia faktoro samdirekta estas la kresko de la pagitaj anoncoj. La enspezoj pro anoncoj estis en 1969 rekorde altaj, kaj ili fakte savis la revuon de ĝia preskaŭ tradicia elpaŝo ekster la buĝeton. Ekde tiu ĉi numero, en alternaj monatoj ankaŭ la du centraj paĝoj de la revuo estos okupitaj de pagita anonco, kaj tio estas unu el la kaŭzoj, pro kiuj estis eble anonci pliampleksiĝon de la revuo: provizore nur partan en la lastaj monatoj de ĉi tiu jaro, sed kompletan ekde januaro 1971. De tiam ĉiu numero estos minimume 24-paĝa. Ni diras: minimume, ĉar, se la lastatempa kresko de pagitaj anoncoj plue kreskos — kiel ĝi certe povas, se niaj membroj energie varbos novajn anoncojn ĉe komercaj kaj turismaj instancoj — tiam tutcerte estos eble pligrandigi la revuon kaj fari ĝin alloga kaj interesa por ĉiuj.

Enhavo

- 89 Institucio Hodler 68
- 90 Ekzempla Dana Kongreso
- 90 Kreskego de traduklaboroj
- 91 BEA programos Esperanto-lernadon
- 91 Dulingva edukado por usonaj infanoj
- 92 Leteroj de legantoj
- 92 Informejo
- 93 Lerneja Bulteno n-ro 17: 1970
- 96 Anonco (Philips)
- 98 Honoraj membroj forpasis (nekrologoj)
- 98 Antaŭ 50 jaroj
- 99 Recenzoj
- 100 Laste aperis ... (novaj eldonajoj)
- 100 Loke — Fake — Persone
- 101 55a Universala Kongreso, Vieno, 1970
- 102 Esperanto — 35 jarojn en Radio Sofia (Esperanto en radio)
- 102 TEJO-novajoj
- 104 Oficiala informilo n-ro 435
- 104 Anoncetoj

La kovrilo

montras tri el la fantaziaj konstruaĵoj de la mond-ekspozicio en Oosaka: supre, pneŭmatika strukturo de la industria grupo Fuji, titolita "Mesaĝo por la 21-a jarcento"; maldekstre, "Belo, Amo kaj Espero", de la grupo Sumitomo, en kiu prezentiĝas kvindekda fabeloj el la tuta mondo; dekstre, promenejo kun rigardo al la pavilonoj bulgara kaj soveta. Okaze de la ekspozicio, la UEA-delegito en Oosaka kun aliaj lokaj aktivuloj jam akceptis per Esperanto vizitantojn el Ĉeĥoslovakujo, Usono, Brazilo, Francujo, Svisujo kaj Svedujo. Intertempe, Japania Esperanto-Instituto kolektis adresojn de dekoj da japanaj esperantistoj en diversaj partoj de la lando, kiuj pretas akcepti eksterlandajn vizitantojn en siajn hejmojn okaze de la ekspozicio. Vizitontoj kontaktu kun la eksterlanda fako de JEI (Hongo 2-2-14, Tokio) minimume du monatojn antaŭ la vojaĝo. (Aldoni 3 int. rpk.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo)

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstreme. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonajoj: S-ro J. Uŝpienski, p/a PEA, ul. Jasna 6, Warszawa 1, Polujo.

Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

INSTITUCIO HODLER 68

- Ekstraktoj el la Estrara Raporto de Instituto Hodler 68 pri la periodo 1968/1969

En la somero 1968 UEA lanĉis la ideon fondi apartan kapitalon, konsistantan el pruntoj je 1000 gld. kaj donacoj je iu ajn sumo, kun la celo plifortigi la financajn rimedojn de UEA per la rento el tiu kapitalo.

La ideo vekis grandan eĥon. Multaj personoj promesis pruntojn, ĉu sen rento kaj kun tempo-daŭro de 6 jaroj, ĉu je rento de 2 % kaj tempo-daŭro de 10 jaroj, dum aliaj malavare sendis donacojn.

Je 28 okt. 1968, oficiale, per notaria akto, estis fondita aparta institucio por administri la kapitalon.

Kiel estraranoj de tiu institucio estis nomitaj s-roj M. Jaumotte, E. L. M. Wensing kaj E. J. Woessink, el kiuj la lastaj du akceptis la funkcion provizore por unu jaro. Kiel administranto estis nomita f-ino M. H. Vermaas.

La mono alfluis, kaj fine de 1968 estis ricevitaj jam pli ol 100 000 gld. Ĉiuj sumoj estis tuj depozitaj en bankon.

En la komenca periodo la tuta stablo postulis sufiĉe da laboro kaj mono, dum apenaŭ estis ankoraŭ enspezoj, tiel ke la unua jaro neeviteble devis finiĝi per malprofito, kiu sumas 535,08 gld.

Ja la rento de la banko pri 1969 — kiu amplek-

sas ĉ. 6000 gld. — estos enskribita nur en 1970, do tiam la deficito tuj malaperos.

Fine de 1969, 33 pruntoj kun rento, 46 pruntoj sen rento kaj donacoj kontribuitaj de pli ol 100 personoj konsistigis la kapitalon de entute 122 876,56 gld.

La kapitalo provizore troviĝis dum 1969 en speciala bankkonto, kiu donas renton ĝis ĉ. 7 %. Intertempe oni konsideris pli favoran investon. Pro diversaj cirkonstancoj, inter kiuj vojaĝoj, malsanoj kaj ŝanĝo de estraranoj, okazis dum 1969 nur unu estrarkunveno, tiel ke ankoraŭ ne estis faritaj tiurilataj decidoj. Ni povas tamen jam menciigi, ke en la komenco de 1970 estas aĉetitaj solidaj akcioj, dum aliaj investoj baldaŭ sekvos.

Estas klare, ke en la unua jaro de tia entrepreno ankoraŭ ne povas esti spektaklaj rezultoj, des pli, ĉar necesas apliki plej grandan zorgon kaj singardemon traktante monon de aliaj homoj. Ni daŭrigas la laboron en granda fido je favora evoluo de la kapitalo kaj ni deziras esprimi apartan dankon al ĉiuj pruntantoj kaj donacintoj, kiuj per sia spontana reago kaj evidenta fido ebligis la kreon de tiu ĉi kapitalo, kies nura celo estas helpi la movadon.

La Estraro

Raportas la administranto

Laŭ la raporto resumita ĉi-supre, ĉiu povas konstati la situacion. Nun, meze de 1970, konsiderinda sumo pro rentoj el 1969 jam estas ricevita, dum la nun farataj investoj ebligas bonajn pliajn enspezojn, tiel ke fine de tiu ĉi unua jaro de rikolto la rezultoj antaŭvideble estos tute kontentigaj.

Ni memorigas, ke laŭ la statuto de Instituto Hodler 68 ĝia unua celo estas "... post kolektiĝo de la necesa kapitalo, el ĝiaj fruktoj disponigi financajn rimedojn al Universala Esperanto-Asocio ...".

Sekve, ju pli granda la kapitalo, des pli granda la subteno al UEA. La celita kapitalo estas 500 000 gld. Ĝis nun estas atingita kvarono de tiu sumo. Tial ni varme rekomendas al ĉiuj daŭre subteni Institucion Hodler 68, disponigante pruntojn kaj donacojn por tiu celo. Oni ja per tio multe helpas kaj perdas malmulte, nome, se oni pruntas, oni cedas nur la plian renton, kiun oni ricevas, se oni deponas la saman sumon en bankon aŭ alimaniere investus ĝin.

Ĝis nun, pruntoj je 1000 gld. venis el la jenaj 17 landoj: Nederlando (17), Svedujo (14), Britujo (12), Germanujo (6), Belgujo (5), Norvegujo (5), Francujo (3), Italujo (3), Aŭstralio, Finnlando, Japanujo, Kanado, Svislando (ĉiuj po 2), Gano, Hispanujo, Nov-Gvineo kaj Usono (ĉiuj po 1). Ni fidus, ke en tiuj kaj aliaj landoj troviĝas pli da membroj,

kiuj povas kaj bonvolas investi mil gld. en la kapitalo ...!

Donacoj venis de pli ol 100 personoj en 20 landoj en ĉiaj sumoj variantaj inter 2021,47 gld. kaj 2,50 gld. Sekvu multaj pliaj sumoj kaj sumetoj!

Pruntojn kaj donacojn oni bonvolu sendi al poŝtĉekkonto nederlanda no. 16 87 544 aŭ al Banko Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam, konto no. 25.50.51.816, ambaŭkaze je la nomo de Instituto Hodler 68, Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam. Plue, oni povas sendi sumojn per ĉekoj, poŝtmandatoj aŭ en alia formo konvena al la sendanto, ĉiam al la adreso de la administranto f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-3002. Varman dankon anticipe pro la solidareco kaj fido de pruntantoj kaj donantoj!

M. H. Vermaas, administranto

NUNA KONSISTO DE LA ESTRARO DE INSTITUCIO HODLER 68

Prezidanto: M. Jaumotte, Belgujo

Vicprez.-sekr.: G. Maertens, Belgujo

Kasisto: E. HaverSchmidt, Nederlando

Membro: W. Bormann, F.R. Germanujo

Ekzempla Dana Kongreso



Tiaj belaspektaj programaj faldfolioj kontribuis al la reklam-efiko de la kongreso de CDEL.

Ĉiam restas demando, kiamaniere efike atingi la publikon en la senco de informado, dum multaj unuopuloj kaj Esperanto-organizaĵoj, i.a. landaj asocioj, daŭre celas tion efektivigi.

Estas Centra Dana Esperantista Ligo (CDEL) inter tiuj organizaĵoj, kiuj klopodas dum pluraj jaroj sisteme levi la nivelon de siaj kongresoj ankaŭ por la informado.

La ĉi-jara kongreso de CDEL, okazinta en majo en urbo Roskilde, postlasis kelkajn fruktojn, kiujn ĝi povis akiri nur per sia bone planita preparo, elspezinte ne neglekteblan sumon.

Okazis en la kadro de ĝia jarkongreso ankaŭ la esperant-lingvaj prezentadoj de Zagreba Pupteatro el Jugoslavio kaj de la teatro "Rapsodo" el Pollando, ambaŭ invititaj de CDEL, per kiuj ĝi povis inviti la danan kulturministron kaj kontakti kun la plej konata dana pupteatristino Jytte Abildstrøm.

S-ino Abildstrøm aranĝis prezentadon de Zagreba Pupteatro (23-membra trupo) ĉe teatro en Kopenhago, kunlaboro kun la dana Unuiĝo de Pupteatroj. "Politiken", unu el la plej grandaj kaj altnivelaj landaj gazetoj, faris ampleksan kaj tre favoran recenzon kun bedaŭro, ke nur unu prezentado estis en Kopenhago. Poste okazis en urbo Aarhus du prezentadoj pagitaj de la komunumo.

Ne ĉio finiĝis per tio. La dana pupteatristino konatiĝis dum la kongreso kun la pola aktorino Karina Waskiewicz, kreinto de "Rapsodo" (unuaktora teatro), kaj aranĝis ankaŭ por "Rapsodo" esperant-lingvan prezentadon en Kopenhago kaj prizorgis preparolon en la gazetaro.

Kroma frukto estas, ke tiu fama dana pupteatristino, al kiu estas prezentita bulgara aktoro/kantisto Mišo Zdravev, kunlaborinta por la dana kongreso, interesiĝis pri la fakto, ke oni povas bele kanti en Esperanto. En baldaŭ farotan radio-programon ŝi promesis enmeti liajn esperant-lingvajn kantojn kiel novajon.

La organizantoj de la dana jarkongreso jam en la komenco sukcesis akiri subvencion de la sumo egala al ĉ. 750 gld. de la kongresa urbo Roskilde.



KRESKEGO DE

Nokta laboro en Ekspo '70


Japana Asocio por la Universala Ekspozicio 1970, la oficiala kontraktinto de Ekspo '70 en Oosaka, havis kvar internaciajn konferencojn por la preparaj aranĝoj kun partopreno de la Ĝeneralaj Komisiitoj de la aliĝintaj ŝtatoj kaj internaciaj organizaĵoj en la moderne ekipita Internacia Konferencujo en Kioto, kie la sistemo de samtempaj interpretoj pli faciligis la konferencan laboron en la tri oficialaj lingvoj, nome angla, franca kaj japana.

Tamen restis nesolvebla la malfacila problemo pri la akurata pretigado ĉiutaga de la protokoloj en la franca kaj angla, kiel preskribite. Oni devis traduki el la japana teksto en la francan kaj anglan.

Sub la peza laboro de ĉi tiu tradukado la funkcioj de la Sekretariato devis laŭvorte maldormi preskaŭ ĉiun nokton dum la konferencoj; dank'al tiu ĉi maldolĉa sperto la ĉefaj membroj de la Ekspozicia Sekretariato aktuale konstatis la malavantaĝon de la pluraj oficialaj lingvoj, kies solvon devus efektivigi, ili konfesas, pli-malpli frue la

Scienca tradukado rekons

Sciencistoj en Usono serioze rekonsideras la tutan ĝisnunan politikon rilate tradukadon de fremdlingvaj (precipe rusaj) sciencaj artikoloj. Tri faktojn ili devas samtempe konsideri. Unue, la kosto de ampleksa traduk-programo estas multe tro alta. La Usona Geofizika Unuiĝo, ekzemple, publikigas kompletajn tradukojn de ok sovetaj geofizikaj revuoj, sed povas tion fari nur dank' al granda subvencio de la ŝtata scienca fonduso (NSF). Due, oni komencas dubi pri la utileco de tiel grandskala traduko, ĉar ne ĉio tradukata havas intereson por usonaj laborantoj. La kompleta kaj amasa tradukado de rusaj revuoj verdire estas postrestaĵo de la usona paniko, kiu sekvis tuj post la lanĉo de la unua sputniko. Fine, la tut-



TRADUKLABORO

Internacia Organizaĵo de la Universalaj Ekspozicioj
per alprenado de neŭtrala lingvo internacia.

Tradukistoj postrestas traduklaborojn

La bezono pri tradukado en la komerco rapide kreskas, kaj ekzistas grava manko de kapablaj tradukistoj, laŭ la usona komerca revuo "Business Week" (Komerca Semajno).

Unu tradukkompanio kun oficejoj en 10 eŭropaj urboj atendas, ke ĝiaj enspezoj pliiĝos je 30 % en 1970 kompare kun 1969, kaj intencas fondi reton de oficejoj tutmonde. Alia kompanio raportis: "Ni ofte ne povas plenumi ĉiujn ricevatajn mendojn."

Samtempe oni plendas pri la malalta nivelo de la nuna tradukado. Interalie, unu usona aŭtomobilkompanio trovis, ke la kromnomo de unu ĝia aŭtomobilo fariĝis fivorto tradukite en la francan. La tradukestro de la elektra kompanio RCA simile raportis: "Ni lernis per amara sperto, ke nekontrolo de kvalito aŭ manko de zorgo ĉe tradukistoj invitas erarojn."

derata

monda 'eksplosa' kreskado de la scienca literaturo minacas dronigi la sciencistojn en maro da papero.

Fronte al drastaj reduktoj de la ŝtataj subvencioj al tiaj traduklaboroj, la fakuloj serĉas radikalan solvon. Eble la plej revolucia solvo nun konsiderata estas la elimino de multaj nun aperantaj sciencaj revuoj, ĉu originalaj, ĉu tradukaj. Multaj opinias, ke sufiĉus eldoni nur resumojn de novaj sciencaj studoj, kaj sendi la plenan tekston de la studoj nur al tiuj, kiuj aparte tion petas. Sur la traduka kampo tio signifus, ke la laboro traduki artikolojn, kiujn eble neniu volos legi, tute forfalos. Senbezono diri, ke estus ankoraŭ pli ekonomie, se la resumoj aperadus tra la tuta mondo en nur unu lingvo!

Dulingva edukado por usonaj infanoj

Ekde la nuna instru-jaro, 76 lernejoj distriktoj en 22 ŝtatoj de Usono komencis uzi du instrulingvojn laŭ nova tutlanda programo por dulingva edukado. En la unua stadio la programo celas helpi al ĉ. 25 000 infanoj kaj gejunuloj, kiuj renkontas malfacilaĵojn en la lernejo pro la fakto, ke ili devenas el familioj, kie oni malofte parolas la anglan.

Sesdek sep el la distriktoj okupiĝos unuavice pri infanoj meksik-devenaj, kies gepatra lingvo estas la hispana. Kvin aliaj uzos indianajn lingvojn, du la ĉinan, du la portugalan kaj po unu la francan kaj japanan.

En iuj el la lernejoj la infanoj ricevos ĝis 75 % de la instruado pere de la koncerna gepatra lingvo. La procentaĵo de anglalingva instruado iom post iom kreskos, depende de la progresoj de la infanoj. Enkadrigitaj en la lecionoj estos ankaŭ studoj pri la historio kaj kulturo de la koncernaj popoloj. En Utah, ekzemple, unu lernejo enkondukis lecionojn pri la historio kaj kulturo de la Navaĥo-indianoj.

La federacia registaro disponigis \$7,5 milionojn por tiu instru-programo en 1969-70.

BEA programos Esperanto-lernadon

Kiel aludite en la aprila numero, tre baldaŭ aperos ankaŭ anglalingva eldono de la kurso "Esperanto-programita" de Hermann Behrmann. Tradukis ĝin la ĉef-delegito de UEA, Grahame Smith, presos ĝin Brita Esperantista Asocio kun teknika helpo de UEA, kaj la tutan reklaman kaj administran laboron por la anglalingvaj landoj organizas BEA en Londono. Komence de aprilo la aŭtoro de la kurso vizitis la oficejon de BEA por plani la preparojn. Intertempe progresis la manuskriptoj ankaŭ por franca kaj nederlanda eldonoj de la kurso, sed ĝis nun mankas la necesaj organizaj fortoj.

Dum februaro kaj marto 1970 alvenis ĉ. 180 novaj aliĝoj al la germanlingva kurso. La "Kampanjo 5000", per kiu s-ro Behrmann alvokis mondonacojn por plivastigo de la reklamado, jam alportis 600 gld., per kio eblis aperigi sesdekon da anoncetoj en 30 diversaj gazetoj de Germanujo kaj Aŭstrujo. En marto partoprenis 15 "programitaj" instruistoj la ĉiujaran Esperanto-kurson en kastelo Schwöbber, sub aŭspicio de la kulturministerio de Niedersachsen.

... kaj ankoraŭ en Israelo: instruisto de la angla lingvo, s-ro Aŝer Ron, aŭdigis en lernejo en Hedera unu el la diskoj, kiuj akompanas la kurs-kajerojn de Behrmann. Rezulto: la direktoro de la lernejo konsentis enkonduki Esperanton en la instru-programon.

MEKSIKO/MEKSIKIO

Skribas Victor González (Meksiko):

Kiam mi unue komencis lerni Esperanton, antaŭ deko da jaroj, frapis min la ofta uzado de la vorto "Meksikio", iom stranga por ni en nia lando.

Estas landoj, kies nomoj finiĝas per "ia" en kelkaj lingvoj kaj finiĝas per "io" en Esperanto. (Ekz. Aŭstralio, Bolivio, Kolombio.) Kaj estas aliaj landoj, kies nomoj ne finiĝas per "ia" kaj do ankaŭ en Esperanto ne finiĝas per "io". (Ekz. Argentino, Gvatemalo, Kanado, Panamo, Peruo.) Meksika Respubliko apartenas al ĉi tiu lasta grupo.

Oni dirus, ke oni aprobis la vorton "Meksikio" por eviti konfuzon inter la nomo de la lando kaj tiu de la ĉefurbo Meksikurbo. Sed, kiel nomi la ŝtaton Meksiko, unu el la 30 provincoj de nia lando? Ĉu ni devas uzi tri vortojn "Meksikujo, Meksikio kaj Meksiko" por eviti konfuzojn? Kaj kion fari pri la nomo de la Golfo de Meksiko kaj kiel nomi la usonan ŝtaton "Nova Meksiko"? Se en Gvatemalo kaj en Panamo ne estas problemoj nomi la landon kaj la ĉefurbon per la sama vorto, kial Meksiko devas esti escepto?

Antaŭ multaj jaroj la nomo Meksiko estis monde konata, kaj, laŭ nia scio, en neniuj anguloj de la mondo kaj en neniuj lingvoj oni trovis problemojn por distingi la landon disde la urbo per la sama vorto.

Laŭ mia modesta kriterio, la vorto "Meksikio" devus malaperi; rilate al nia lando, sufiĉas la vorto "Meksiko".

KVINMILIONA URBEGO

Skribas Probal Daŝgupto (Bengalujo):

Mian urbon oni nomas bengale Kolkata, hindie K'lk'ttá, angle Kælkat', orise kaj asame Kolikata, france Kalkyta, germane Kalkuta, svede Kalkota, ruse Kalkutta. Bela aro! En Esperanto konkuras la formoj Kalkuto ("Mondmapo"), Kalkato ("Utila manlibro pri Hindujo"; vortaro de Wells), Kalikato ("Malsata ŝtono"; "Jaroj sur tero"; "Plena ilustrita vortaro") kaj Kolkatao (en kelkies korespondadoj).

Ĉar mankas internacieco, kaj ĉar la hindia akcento trafas la silabon 'ta', mi proponas, ke la esperantistoj unuece uzadu "Kolkatao"-n en ĉiaj tekstoj kaj "Kolkata"-n sur leterkovertoj. La evidente ebla formo "Kolkato" estas rifuzita pro la hindia akcento kaj pro la homonimeco kun "kol-kato". La formo "Kolikata" jam preskaŭ formortis el la bengala, do "Kolikato" impresus arkaika, dum "Kalikato" devas esti rezervita por sudhinduja haveno (Kalikat).

Kontraŭ "Kalkato" kaj "Kalkuto" parolas la fakto, ke ili tute ne respektas la lokalingvan formon. (Se oni serioze celas "ortografian" — ne prononcan — internaciecon, do ol "Kalkuto", ja pli taŭgus "Calcutto", la angla formo!)

Skribas Erik Ekström (Svedujo):

Korektu ĝustatempe viajn informojn por la delegitaro en la Jarlibro kaj evitu nenecesan ĉagrenon. Adresoj, telefonnumeroj kaj entute ĉiuj indikoj pri la delegiteco estas egale valoraj. Jen kiamaniere tia neglekto povas grumbli la humoron.

Mia koresponda amiko en iu azia urbo solenis sian datrevenon. Kiel delegito de UEA li ankaŭ indikis sian telefon-numeron apud la adresoj, kaj tio donis al mi la ideon gratuli per persona telefon-parolo. Pro la kvinhora tempodiferenco kaj por esti inter la unuaj gratulintoj mi mendis vespere en la antaŭa tago. Sed en la aktuala momento venis informo, ke neniuj respondas je tiu numero. La saman procedon mi ripetis en la sekvinta tago, sed kun same negativa rezultato. Nur post telegrama kontakto venis iom honte la klarigo: "Pro telefona rekonstruo ŝanĝiĝis la numerado, kaj mi forgesis tion korekti ĉe la UEA-oficejo."

PRI NOVAJ DELEGITOJ

Skribas David Wild (Britujo):

Lastatempe vi ne publikigis en "Esperanto" la adresojn de la nove akceptitaj delegitoj. Mi ĉiam provas teni mian jarlibron ĝisdata, sed la libro estas malpli utila, ol antaŭe. Ĉu vi eldonos suplementojn por la Jarlibro en la estonteco?

Respondas la redaktoro:


Ni ne plu publikigas la adresojn en "Esperanto", ĉar ni klopodas dediĉi kiel eble plej multe da spaco en la revuo al pli legindaj artikoloj, al pli da bildoj ktp. Ni kredas, ke ĝenerale la legantoj tion preferas. Ni krome konstatis, ke nur tre malmultaj membroj efektive ĝisdatigas sian jarlibron laŭ la informoj en la revuo. Nuntempe ni planas radikale novan sistemon de redaktado por la Jarlibro, do estas ankaŭ eble, ke ni estonte eldonos suplementojn aŭ simile.

INFORMEJO

Vi demandas — ni respondas

KIO estas la plej longa vorto trovita en la Esperanta literaturo?

Respondo: Ni antaŭkalkulis la tempon necesan por traserĉi la tutan Esperanto-literaturon por povi respondi vian demandon, kaj decidis rezigni! Eble niaj legantoj povos kontribui al la serĉo, sciigante la plej longan vorton, kiun ili mem renkontis.



PEDAGOGIO KAJ LA ESTONTECO DE ESPERANTO

El 13-jara praktikado en Esperanto mi alvenis al du gravaj konstatoj:

1. Hodiaŭ nia movado estas ankoraŭ malforta. Ni havas, vere, multajn parolantojn de la Internacia Lingvo, sed ilia forto estas diserigita, ili agadas plenforte en ĉiuj direktoj: redaktas gazetojn, gvidas kursojn, direktas teritoriajn aŭ landajn asociojn, redaktas kaj aŭskultas radio-dissendojn, korespondas, informadas, organizas kaj partoprenas diversajn renkontojn ... kaj krome faras sian ĉiutagan laboron.

2. Bedaŭrinde nia movado delonge enhavas gravan malsanon finfine kuracendan; nome, ĉiu ambicias eltrovi ian novan organizaĵon, fakrondon, revuon ktp., per ĝi dezirante savi la mondon. La elpensinto tuj komencas ardan agitadojn por varbi novajn, entuziasmajn adeptojn. Post ioma tempo evidentiĝas, ke lia "mondosava" ideo ne trovis sufiĉan eĥon, sekve okazas elreviĝo.

Per scienco al vasta publiko

Finfine ni devas distingi! Estas necese montri la ĉefdirekton, la plej gravan taskon al la tuta esperantistaro. Izolite, kvankam de tempo al tempo montriĝas rezultoj, neniuj povas ŝanĝi la situacion, sed kune la nuna anaro jam kapablas fari ion decidan.

Kiu vojo do estas reala? Mi ne eldiros ion novan: **alkonduki la pedagogojn, la fakinstruistojn. Jen la tasko ĉefĉefa.** Por ke nia membraro multiĝu, ni devas instrui. Evidente. Instrui plej efike scias pedagogo, antaŭ ĉio profesoro pri fremdaj lingvoj. En la nuna situacio de nia movado unu entuziasma esperantisto-pedagogo valoras almenaŭ 8-10 alifakulojn. (Tio ne celas ofendon al tiuj ĉi. Tre povas esti, ke en sekva historia stadio ilia laboro dominos, kaj falos tiu de la instruistaro.) Por akiri novajn edukistojn ni povas uzi ankaŭ la tradiciajn metodojn. Ĉe lerta agitado ankaŭ ili altiras pliajn adeptojn, vera pedagogo estas ja idealisto, kaj tio faciligas nian laboron. Kio povus kvazaŭ revolucie ŝanĝi la opinion de la instruistaro kaj eble eĉ tiun de superaj klerigaj instancoj?

Laste Jerzy Mazys en sia artikolo ("Pola Esperantisto", 3/1969: Esperanto - ideologio aŭ praktika instrumento) trafe akcentis la rolon de la scienco. Mi samopinias. Ne sufiĉas jam spirita, t.e. abstrakta efiko. Ni devas pruvi konkrete la avantaĝon de la Internacia Lingvo. Jerzy Mazys proponas plurajn fakojn, kie ni devas ekagi science. Kaŭze de nia malvasta aktivularo komence mi reduktus ilin al unu, al la plej grava por ni scienco, pedagogio. Esperanto science aplikita al pedagogio altiras novajn, valorajn tavolojn de la instruistaro. Kaj, ĉar inter niaj vicoj troviĝas jam kelkaj talentaj instruistoj-specialistoj, probable sen granda peno ni povus efektiviĝi eldonon de altnivela Internacia Pedagogia Revuo, kiu krom originalaĵoj publikigus

tradukojn el diversaj fakrevuoj. Ĝi entenus datfreŝajn, aktualajn atingojn, eksperimentojn. La revuo nur parte celus niajn instruistojn-esperantistojn, ĝiaj paĝoj direktiĝus al ĉiuj fakuloj de pedagogio, sekve ĝi enhavus resumojn en kelkaj naciaj lingvoj. (Simila provo ĉe "La Monda Lingvo-Problemo"; sed ĉi-okaze ni devus fari inverse: artikoloj en Esperanto, resumoj en naciaj lingvoj.) Tiamaniere ni larĝigus la sferon de la reklamo, verŝajne atingus abonon de ĉefaj bibliotekoj, pluraj lernejoj, klerigaj instancoj. Tra la paĝoj sen rekta agitado por Esperanto evidentiĝus la praktika utilo de la Internacia Lingvo en tiu medio, kiu estas en la centro de nia intereso. (La revuo havus, do, pli larĝan horizonton, ol la ĵus lanĉita Internacia Pedagogia Revuo. Kompreneble mi ne staras kontraŭ ĝi, sed mi intencas vastigi ĝian efikon al neesperantistoj.)

Ŝajne mi venis al kontraŭdiro: komence de la artikolo mi plendis pro troŝarĝiteco, kaj jen, mi denove eltrovis ion novan, plusan. Sed el la projekto skizita klariĝas, ke ĉi-okaze temas ne pri ia nacia bulteno, male, pri altnivela scienca revuo agnoskota ankaŭ en la fakliteraturo. Mi konscias, ke la revuo bezonus subtilan, penan laboron, eble neglekton de aliaj terenoj, sed la fruktoj de la penado montriĝus post kelkaj jaroj.

Alloga kaj facila gazeto

Aliflanke, ni pedagogoj urĝe bezonus belaspektan, bildriĉan, facillingvan gazeton por la lernantoj, per kiu ili povus fieri antaŭ siaj kamaradoj. Tia, vere alloga kaj facila gazeto povus esti ekzemple "La Praktiko".

Laŭ informo de CED ("Esperanto", n-ro 770, p. 12) en la lernojaro 1968/69 Esperanto estis instruata en 543 lernejoj de 31 landoj al 16 505 gelernantoj. Ĉu al tiuj lernantoj ni povas doni konvenan literaturon? Ĉu prezentado de niaj gazetoj efikas al ili ĉiam instige? Kelkfoje kontraŭe! Ĉar post unu-du jaroj da lernado, leginte el ili kelkajn liniojn la lernanto konstatas: mi komprenas preskaŭ neniom. Kaj tio estas ege malagrabla, ofte inspiras al li pensojn: Esperanto estas malfacila, neellernebla same kiel la naciaj lingvoj. Krome, tian gazeton eble kun ĝojo ekuzas niaj "eternaj" komencantoj, por kiuj la aliaj revuoj estas tro altaj. Ĉu tiom da homoj ne meritus apartan gazeton? Miloj da geknaboj edukiĝus per ĝi, precipe, se ni saturus ĝin per la spirito de reciproka amikeco.

Kompreneble mi ne elskribis ĉion. Mi intencis nur substreki la esencon de unuanima akordo rilate pedagogion kaj deziris urĝigi gravajn, konkretajn paŝojn al serioza laboro en tiu ĉi tereno, ĉar mi kredas, ke por ni ne nur 1970 estas jaro de edukado, sed ankaŭ vico da venontaj jaroj.

Géza Kurucz

1970:
Internacia
Jaro por
Edukado



INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

INTERNACIA
PEDAGOGIA
REVUO

Jarkolekto 1



Januaro 1970

Nürnberg

N-ro 0 (Provnumero)

oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj, aperas 3-foje jare, abonprezo 6 gld. (unuopa kajero 3 gld., provnumero 2 gld.); 24 + 4 paĝoj, formato 16,5 x 24 cm; redaktoro: H. Sonnabend, Im Eckerskampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, F.R. Germanujo; eldonejo: L. Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, F.R. Germanujo.

Pli ol dumonata malfruiĝo plialtigis la scivolemon de la esperantistaj pedagogoj. Jen, finfine, la unua kajero de la nova Internacia Pedagogia Revuo (IPR). Tiu ĉi strangakalkula numero nula (provnumero) havas 24 internajn kaj 4 kovrilajn paĝojn.

La artikoloj estas klasifikitaj en kvar specojn: (A) teoriaj artikoloj el la pedagogia scienco, (B) fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj, (C) informoj el la pedagogia vivo, (Ĉ) opinio, propono, deziro, sciigo. El la 5 ĉefaj artikoloj de la grupoj A kaj B, ampleksantaj kune 18 paĝojn, nur 2 traktas tiu-grupajn temojn: la didaktikan lokon de Esperanto

en lernejoj (Szerdahelyi), kaj la modernigon de matematik-instruado (Balács); la aliaj 3 artikoloj estus devinaj aperi kiel informoj el la pedagogia vivo. Ŝajnas, ke estus nepre necese multe pliekzaktigi kaj pliampleksigi tiujn kontribuojn de Bianco/Dazzini pri nova matematiko en italaj elementaj lernejoj (artikolo, kiu nenion diras pri la substanco de tiu nova matematiko, sed parolas nur pri la malfacilaĵoj efektiviĝi ĝin), de Minnaja pri matematiko por inĝenierstudentoj en Italujo kaj de Dazzini pri lecionhoraro pri ekonomio (tro ĝeneralaj eldiroj sen indikoj pri prezentomaniero dum instruado). La informoj en grupoj C kaj Ĉ pri plumamikeco, pri Esperanto-instruado en Bulgarujo, Hungarujo, Usono kaj Hindujo, pri la instruistaj konferencoj en Maribor, pri Esperanto kiel peranto inter anglaj kaj japanaj infanoj kaj pri la Kunordigitaj Esperanto-Kursoj estas tute utilaj.

Certe ni instruistoj esperantistaj devas ankoraŭ multon lerni, ĉar serioza pedagogia revuo enhavu nepre lingve perfektajn kontribuojn. Kvankam pri la preseroj, ne maloftaj en la unua kajero de IPR, kulpas presisto kaj korektinto, lingvajn misojn (leksikajn, gramatikajn kaj stilajn) devas eviti aŭtoroj kaj redaktoro.

Konklude, la provnumero de IPR prezentas interesan por ĉiuj edukantoj materialon. La revuo estas diverspunkte plibonigenda. Sed ekzistas neniu dubeto, ke tiu ĉi IPR estas absolute subtenenda klopodo fare de la nova ILEI-estraro por doni modernan instrumenton en la manojn de esperantistaj instruistoj. Sukcesigi IPR-n povas ni ĉiuj, profesiaj kaj familiaj edukantoj, per propra verkado, tradukoj de nacilingvaj artikoloj kaj... amasa abonado!

KASTORA KLUBO

Kiel ligi la lernejan junularon?

Kiam TEJO kaj ties Landaj Sekcioj varbas membrojn, ili ofte forgesas, ke ne ĉiuj junaj esperantistoj estas alparoleblaj samtone kaj samnivele. La artikoloj troveblaj en "Kontakto" kaj LS-bultenoj estas kutime direktitaj al gejunuloj minimume 16-jaraj. Por konstantigi aŭ eĉ plifortigi la alfluon de junaj Esperanto-parolantoj en nian movadon necesas tamen ligi jam multe pli junajn personojn al la movado ol nur 16-18-jarulojn.

Kvankam ni ĉiujare denove parolas pri tiom kaj tiom da lernantoj de la Internacia Lingvo, ni devas samspire konstati, ke tiuj lernantoj ne efike influas la membronombrojn de LS-j kaj de TEJO. La plejmulto perdiĝas post kurso. La problemo do estas: Kiel ni povas interesi tiujn gejunulojn, ofte malpli-ol-15-jarajn, pri la Esperanto-movado? Kion aĝo-adekvatan ni povas proponi al ili?

Feliĉe, tiuj ĉi demandoj estas iom artifikaĵoj. Ĉar jam de 1964 ekzistas respondo en formo de la "Kastora Klubo de Esperanto", kiun bedaŭrinde kaj nekompreneble la instancoj de la movado neniel sufiĉe atentis. Tiuj "kastoroj" (nomo alu-

danta inteligentecon kaj diligentecon de tiuj bestoj) estas 7-ĝis-16-jaraj lernantoj aŭ scipovantoj de Esperanto. La klubo, kiu ne havas kotizon, sed petas subtenon de pliaĝuloj, havas proksimume 150 membrojn en 10 ŝtatoj kaj modestan bultenon, sub la nomo "Kastora Letero". La infanoj estas instigitaj plibonigi siajn lingvokononajn kaj praktikadi Esperanton per korespondado kaj vizitado al renkontiĝoj, kaj plenumante tiujn kreskantajn postulojn ili promociiĝas: kastoreto iĝos bruna, arĝenta aŭ ora kastoro.

Kial ne ĉiuj instruantoj de Esperanto plene ekspluatas tiun ĉi institucion, kiu ne suĉas monon el infanaj aŭ gepatraj poŝoj kaj kiu ja ege utilan helpon donas al la lernantoj? Tiel infanoj lernantaj la Internacian Lingvon povas senti sin anoj de internacia asocio kaj kontakti siajn similaĝajn kamaradojn. Por ili ekzistas apliko de Esperanto ankaŭ ekster kaj post la kurso.

Pliajn informojn volonte donos la "Ĉefa Kastoro", J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester M31 1PS, Britujo.



Post la 3a en Helsinki jen la 3a en Maribor

Sub aŭspicio de la respublika sekretario por kulturo kaj klerigo de S.R. Slovenujo, s-ro Slavko Bohanec, kaj en la kadro de la Internacia Jaro por Edukado 1970, proklamita de Unesko, okazis de la 27-a ĝis 29-a de marto 1970 en la domo de sociaj organizoj en Maribor, Jugoslavio, la 3-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn. Partoprenis 42 reprezentantoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio kaj du observantoj de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Ĉeestis krome oficialaj delegitoj de la lerneaj instancoj de Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo kaj Jugoslavio, kaj la prezidanto de la komisiono por publika instruado kaj belaj artoj de la itala senato skribis esprimis sian intereson pri la konferenca laboro. Surbaze de la raportoj kaj diskutoj iĝis akceptitaj jenaj

Konkludoj

1. La lerneaj komisionoj de ŝtatoj-membroj klopodu krei konstantan kontakton kun la superaj oficialaj organoj kompetentaj pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn.

2. Surbaze de la raportoj faritaj de unuopaj landaj lerneaj komisionoj la Konferenco instigas al daŭrigo de instruado en ĝisnunaj formoj kaj en la celo de plua evoluigo de Esperanto-instruado kaj proponas al kompetentaj lerneaj instancoj de ŝtatoj-membroj enkonduki eksperimente devigan instruadon de Esperanto en difinita nombro da lernejoj. Estus konsilinde, ke la instruado de Esperanto komenciĝu post 4 jaroj da elementa lerneja studado kaj ke ĝi daŭru minimume tri jarojn.

3. La Konferenco komisiis la fakan gvidadon de la eksperimenta deviga instruado de Esperanto en lernejoj al la Esperanto-fako de la Scienca Universitato "Eötvös Lóránd" en Budapeŝto kaj ŝarĝas la fakestron organizi labor-grupon el la fakaj reprezentantoj de unuopaj lerneaj komisionoj. La tasko de la labor-grupo estas:

Maribor en Jugoslavio fariĝas ĉiam pli la centro por internaciaj instruistaj renkontiĝoj. Sur la foto: la partoprenintoj de la 3a regiona Kunordiga Konferenco.

a) prepari la necesan bazan dokumentaron (instruprojekto, kompleksa didaktika minimumo, instrumentodaj rekomendoj k.s.),

b) fakte gvidi kaj sekvi la fluon de la eksperimento kaj raportoj pri la fakaj konkludoj de la eksperimento.

4. La Konferenco fondas sian informan servon por interna reciproka informado de la lerneaj komisionoj kun sidejo ĉe la Konstanta Organiza Komitato en Maribor.

5. Por demonstri la praktikan valoron de Esperanto-instruado en lernejoj la Konferenco komisiis al la Bulgara Lerneja Komisiono organizi labor-grupon, kiu helpu en tiu laboro (korespondado, renkontiĝoj, ekskursoj, ekspozicioj, kultur-artaj aktivecoj k.s.).

6. Por kunhelpi la realigon de tiuj taskoj la Konferenco decidas sendi — por informo — la materialon de la tria Konferenco al la invitataj oficialaj instancoj.

Refoje al Maribor

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazigos sian Internacian Instruistan Konferencon en la kadro de la Internacia Jaro por Edukado de la 28-a ĝis 31-a de julio 1970 en Maribor, Slovenujo, Jugoslavio.

La programo antaŭvidas enkondukan prelegon de la prezidanto de ILEI, prelegon de Helmut Sonnabend pri "La Internacia Jaro de Edukado surbaze de la Internacia Lingvo", kunsidon kun delegitoj de la loka Instruista Sindikato kaj, precipe, laborojn de 7 komisionoj. La 31-an de julio oni komune veturos trajne al la 55-a UK en Vieno.

La konferenca kotizo estas 20 jugoslavaj dinaroj (proks. 6 nederlandaj guldenoj). Ekzistas tri diversklasaj hoteloj kaj studenta domo, en kiu unu lito en dulita ĉambro kostas ĉiunokte nur 15 dinarojn. La konferenco estas en la Alta Ekonomi-Komerca Lernejo, Maribor, Razlagova 14. Petu detalojn kaj aliĝu — nepre antaŭ 15.06.70 — ĉe: s-ro L. Prebil, Tomanova ul. 19, Maribor, Jugoslavio.

KONCIZE EL POLLANDO

Esperanto estas aktuale instruata, kompreneble kiel nedevisa objekto, en 102 elementaj, mezgradaj kaj superaj lernejoj en Pollando. — En Lodzo okazis de la 3-a ĝis 5-a de januaro 1970 la 10-a Tulpollanda Konferenco de Esperanto-instruistoj kun 150 partoprenantoj. — 120 instruistoj partoprenas novan korespondan kurson kaj prezentiĝos en la lernojaro 1970/71 al ekzameno pri instrukapablo. — Fine de marto la vicministro por klerigo kaj superaj lernejoj akceptis du delegitojn de Pola Esperanto-Asocio kaj promesis pluan subtenadon.

vi simple ne po

Homo ne povas esti malaktiva. Tute egale, ĉu li kreas por kontentigi artisman bezonon aŭ okupiĝas pri industriaj aŭ mastrumaj aferoj, li ne povas ĉesi labori. Malmultaj volas. Sed okdek-jaruloj scias, kiom ŝanĝiĝis la karaktero de la laboro.

Industriaj entreprenoj ankaŭ memoras, kiom evoluis laborkondiĉoj. Unu el tiuj entreprenoj estas Philips.

Fondita en 1891, la kompanio havis la privilegion kontribui al tiu teknika disvolviĝo per ampleksa sortimento da industriaj produktoj, ekde veldiloj ĝis elektronikaj mezur-instrumentoj, de integritaj cirkvitoj ĝis fermit-cirkvita televido.

Philips ankaŭ provizas hospitalojn per X-radiaj kaj medicinaj aparatoj, tiel ebligante al multaj, kiuj alie estus nelaborpovaj, repreni sian lokon en la homa komunumo.

Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips

vas cesi labori



PHILIPS



Honoraj membroj forpasis

NEKROLOGOJ

**Antonio Caetano
Coutinho**

ANTONIO CAETANO COUTINHO (1879-1970)

Veterano A. C. Coutinho mortis en Rio de Janeiro la 15an de februaro 1970. Li lernis Esperanton en 1898, varbite de la unua esperantisto brazila, la supera juĝisto d-ro Baggi de Araujo. La broŝuron "Unuaj lecionoj" de Cart li tradukis portugalen, kaj la tradukon eldonis Hachette en Parizo. Jam en 1905 li estis elektita en la Lingvan Komitaton. Multon li verkis en Esperanto, precipe por "Brazila Esperantisto", kies direktoro li estis. "Esperantaj prozaĵoj" prezentas belan tradukon lian. "Antologio de brazilaj rakontoj" estis grandparte reviziita de li. En 1950 UEA aklamis lin Honora Membro. Diploma pri farmacio, li plenumis la oficon de FD. Centojn da kursoj per korespondado de BEL li zorgeme gvidis.

HEINRICH FUNK

La 1an de marto 1970 mortis Heinrich Funk, multjara prezidanto kaj estrarano de la Esperanto-Societo Fulda, F.R. Germanujo. Li lernis la lingvon en 1907, kunfondis grupon en Heilbronn kaj estis malnova membro kaj delegito de UEA.

JANIS LOJA (1896-1970)

Forpasis la elstara latva lingvisto Jānis Loja, esperantisto de post 1913 kaj en la lastaj jaroj membro de UEA. Li estis sinsekve lektoro kaj profesoro en diversaj universitatoj kaj altlernejoj de Leningrad, Moskvo, Gorkij, Riga kaj Liepaja. Iama vic-direktoro de la Eldonejo de Vortaroj, li mem verkis vortarojn latva-rusan kaj rusa-latvan. En siaj lingvistikaj verkoj li ofte pledis por la Internacia Lingvo.

MARIÀ SOLA I MONTSERRAT

Marià Solà, 74-jara, forpasis la 18an de februaro 1970. Li lernis Esperanton jam en 1909 kaj estis unu el la ĉefaj pioniroj de la kataluna Esperanto-movado. Li estis siatempe membro de la Lingva Komitato, dumviva membro de UEA.

FRANÇOIS DE KINDER

Mortis la 27a de aprilo F. De Kinder, la fondinto de la Montreala Esperanto-Klubo, Kanado, 79-jara. Li estis fak-delegito de UEA.

GEORGE SHEPHERD

Mortis la 27an de februaro George Shepherd, delegito de UEA en Newcastle-upon-Tyne, Britujo, 76-jara. Li lernis Esperanton en 1910, kunfondis la lokan societon kaj regionan federacion kaj estis tre malnova membro de la Asocio.

JORGE DE SALDANHA CARREIRA (1887-1970)

La sepan de februaro, pro aŭtomobila akcidento, mortis Saldanha Carreira, kiu dum multaj jaroj estis kvazaŭ la personigo de Esperanto en Portugalujo. Li lernis la lingvon en 1913 kaj klopodis disvastigi ĝin eĉ en militaj tranĉeoj. Li estis unu el la fondintoj de Portugala Esperanto-Asocio, ĉef-delegito de UEA de 1932 ĝis 1949, iama membro de la Lingva Komitato kaj kunaŭtoro de sukcesa lernolibro "Curso Elementar de Esperanto". En 1951 la Komitato de UEA nomis lin Honora Membro de la Asocio. Li gvidis diversajn kursojn, interalie en lisbona radio-stacio (1932), kaj li estis unu el la ĉef-kunlaborantoj de "Enciklopedio de Esperanto" (1933-34). Ĉiujn Esperantajn librojn de sia riĉa biblioteko li postlasis al la Biblioteko de UEA, "honore al d-ro Edmond Privat".

ERWIN STOLPE (1894-1970)

La vic-prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, Erwin Stolpe, mortis en Berlino la 13an de aprilo 1970. Li partoprenis la organizitan Esperanto-movadon jam de 1913. Inter 1947 kaj 1960 li deĵoris kiel juĝisto ĉe la supera tribunalo de Berlino.

ERICH DAHLMANN (1901-1970)

Subite mortis Erich Dahlmann (Berlino), membro de post 1947 kaj delegito dum pli ol 20 jaroj, je la 21a de marto 1970.



**Jorge de Saldanha
Carreira**

Antaŭ 50 jaroj

— en "Esperanto", n-ro jun. 1920

La minimuma salajro. "La ideo leĝe fiksi minimuman salajron venas de Aŭstralio, unue de la ŝtato Victoria. Kelkaj aŭstraliaj ŝtatoj fiksas leĝan minimuman salajron, kiun rajtis ĉiu laboristo havanta normalan kapablon. En 1917 brita leĝo fiksas la minimuman salajron de la terlaboristoj; en la sama jaro, la svisa registaro decidis minimumajn salajrojn en la brodindustrio. Francujo en 1915, Norvegujo kaj Aŭstrujo en 1918, Svislando en 1919 sekvis tiujn ekzemplojn."

Pri la nunaj monbaroj. "La milito pasis ... Sed bedaŭrinde la interrilatoj inter la diversaj mondopartoj estas malhelpataj ne nur de la limbaroj, sed la plej gravaj malhelpaĵoj estas la monbaroj. Ekzemple por germanaj esperantistoj nuntempe estas preskaŭ neeble aboni gazetojn, aniĝi al samcelaj societoj alinaciaj, aĉeti esperantaĵojn alilandajn ktp. pro la malalta valoro de la mono registara. La movado por Esperanto multe plivigliĝus, se grupoj aŭ izoluloj povus ree aboni eksterlandajn gazetojn, ĉar sin okupi per Esperanto nur kun samlandanoj estas same kvazaŭ trinki kafon sen vera kafo, sen lakto, kremo kaj sukero ... Forigi tiujn barojn ŝajnas plej urĝa bezono por la esperantistaro ..."

BRILA KAJ ORIGINALA RAKONTO

Recenzas F. de Diego (Hispanujo):

Kristo el bronzo, de Nagayo-Yosio. Tr. Ueyama masao. Oosaka: Pirato, 1970. 108 p. Frontispico. 19 cm.

La libro rakontas epizodon fantazian, duone historian, okazintan dum la regado de ŝoguno Iecuna (1650-1680) en la feŭda Japanujo, kiam oni persekutis kaj ekzekutis ankoraŭ la konvertitojn al la katolikismo.

La ĉefa rolulo, Hagihara-Yuusa, ricevas la mendon muldi sur bronza plato la plej sanktajn figurojn de la katolika kulto. Per tiaj platoj oni volas fari provon kontraŭ la personoj, kies alligitecon al la katolikismo oni suspektas; kiuj senhezite surtretos la muldaĵojn, retrovos la liberon; kiuj rifuzos, ricevos torturon kaj morton. Sed Hagihara-Yuusa metis tiom da fervoro kaj artismo en sian verkon, ke la aŭtoritatoj, taksinte lian pure artan inspiron kiel entuziasmon de prozelito, ordonis, ke ankaŭ lin oni ekzekutu.

Per ĉi tiu brila kaj originala rakonto, kies tre alta plastika valoro ebligis ĝian facilan filmigon, Nagayo-Yosio ŝajnas konkludi, ke konscie aŭ nekonscie, la homoj kun nobla kaj pura koro ofte falas en la reton metitan de la malicaj, potencavidaj kaj fanatikaj, kaj ke ili estas la preferataj viktimoj de la "mistera manipulado de la sorto", kiel la aŭtoro diras.

Inter la aliaj roluloj de la romano elstaras la alloga figuro de la "juĵo" (amoristino) Kimika, kies bonkoreco parigas ŝin al ŝia neforgesebla samprofesiulino, al "Boule de Suif" (Maupassant).



Parte fantazia, parte historia estas la romano "Kristo el bronzo" de la japana aŭtoro Nagayo-Yosio.

Fantaziaj estas multaj el la detalaj rakontaĵoj; historiaj faktoj, tamen, estas jena bronza plato, la torturoj kaj la ekzekutoj.

La traduko de Ueyama-Masao ne estas sukcesa, kvankam ie kaj tie li kapablas skribi per tre esprimiva, matura Esperanto. Kiel bedaŭrinde, ke oni forgesas tro ofte la saĝan konsilon de Waringhien: "Neniam publikigu tradukon, eĉ deklinian, kiun vi ne kontroligis al klera, alilingva esperantisto!"

Mendu ĉe UEA: 4,50 gld. + sendokostoj 10 %.

PROFITIGA POR LA STILO

Recenzas Dermot Quirke (Londono):

English phrases and expressions in Esperanto, de Felix Woolf. Cardiff, Kanado: Esperanto Press, 1969, 120 p. Ofset. 21 cm.

Al la kritiko, ke — eĉ se taŭga por trakti sekajn sciencaĵojn — Esperanto tamen neniam rivalos la belajn kadencojn de la "maturaj lingvoj", ni fiere kontraŭmetas, ne nur niajn poeziajn majstroverkojn, sed ankaŭ la kolore riĉajn prozaĵojn de Rossetti, Ribillard, k.a. Tamen la kritiko restas ne tute senmotiva, ĉar necesas konfesi, ke la ĝenerala stilo de la esperantanoj, eĉ se gramatike senerara, povas esti sensuka, seka, maŝina.

Konscia pri tiu difekto, Zamenhof jam antaŭ sesdeko da jaroj aperigis sian frazaron "Proverbaro Esperanta", kiu, krom la proverboj mem, estas riĉa je belaj, sukaj parolturnaj frandaĵoj. Estas

bedaŭrinde, ke tiu lia ĉefverko restas ankoraŭ malmulte legata, des malpli rikoltata.

Bonvena do estas la nova frazaro de Woolf, kiu celas provizi trafajn ekvivalentojn por vivaj idiotismoj de la angla lingvo. Multaj ĉerpiĝas el la "Proverbaro", pli multaj el la vivanta frazostoko de nia lingvo — kaj kelkaj el la cerbo de la aŭtoro mem. Ne ĉiu provo sukcesas: kelkaj maltrafas la celon, aŭ estas katastrofe feblaj (ekz-e, 'once in a blue moon' = 'tre malofte' — fu!). Ne malofte la Esperantaj tradukoj nuance diverĝas de la angla signifo; tre ofte ili ne respondas gramatike. Sed la eldonisto invitas plibonigon kaj kunlaboron, do kiu plendos? Kaj malgraŭ la manketoj, se anglalingva esperanto sorbos ĉi tiun frazaron kun nur guteto da prudento, lia stilo nepre profitos.

Mendu ĉe UEA: 7,50 gld. + sendokostoj 10 %.

LOKE - FAKE - PERSONE

LOKE

Belgujo

• La ministerio de edukado belga dissendis specialan cirkuleron la 10an de marto (n-ro II-5/HW/IV) al ĉiuj lernejoj inspektoroj kaj lernejestroj por atentigi ilin pri la Semajno de Internacia Amikeco, aldonante liston da praktikaj sugestoj por instruado en la kadro de religiaj kaj moralaj studoj.

Britujo

• Cento da partoprenantoj el 5 landoj sukcesigis la "markolan" kongreson, kiu okazis en Folkestone. En 1971 okazos simila renkontiĝo en norda Francujo.

Ĉeĥoslovakujo

• Originalan inform-vesperon por la publiko aranĝis la 10an de aprilo la klubo en Mor. Budejovice. Sub la titolo "Tendarfajro en civilo" prezentiĝis kantoj ĉeĥaj kaj Esperantaj kun gitara akompano. Kantis kvar geskoltoj. La iom stranga titolo kaj teatreca prezento allogis pli ol 60 gejunulojn.

• En banloko Dudince okazos Somera Fiera Restado en 5-19 julio ĉijare. Tie oni lernos Esperanton, sunbanante, kaj naĝos en varmakva fonto. Informojn donas s-ro E. Vána, Dudince, okres Zvolen.

Finnlando

• Internacia Esperanto-kampadejo organizas la kluboj de Heinola, Lahti kaj Vääksy, kune kun Esperanto-Asocio de Finnlando, 5-11 julio 1970. Bela lagborda situo, komfortaj sed malmultekostaj loĝejoj kaj servoj kaj internacia programo faras la aranĝon aparte alloga. Informas detale: Esperanto-Klubo, Vääksy, Finnlando.

Francujo

• Nova kampadejo apud Mediteraneo, simila al tiu de Primošten, ekfunkcios en Balaruc les Bains, suda Francujo, en julio 1970. Komuna Esperanta renkontiĝo okazos tie de la 1a ĝis la 15a de julio. Informas: Lentaigne, 3 ave. de la Gailarde, F-34 Montpellier.

Usono

• Ekde februaro 1970 Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko komencis eldoni novan, ofsete presitan bultenon, "ELNA-Bulteno". Ĝi estas komplete esperantlingva.

FAKE

Komerco

• La grupo Centro Esperanto Rimini, en Italujo, planas starigi unu aŭ plurajn butikojn en tiu multe vizitata turisma urbo por disvendi varojn en ĉiaj landoj profite al la Esperanto-movado. Adreso por interesitaj komercantoj: Piazza S. Bernardino 26, I-47037 Rimini.

Medicino

• Atentaj legantoj de "Esperanto" certe rimarkis inter la anoncetoj plurfojan alvokon de la brita Asocio pri Psoriazio. La jarkunveno de tiu organi-

ALTA POEZIO DE MACHADO

Recenzas Leopoldo Knoedt (Salvador):

La lando de Alvargonzalez, de Antonio Machado. Tr. F. de Diego. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio, 1969. 47 p. Ilus. 18 cm.

Henri Vatré en sia antaŭparolo al "La lando de Alvargonzalez" faras pledon por la asonanco, tute pravan, almenaŭ kiom koncernas tradukojn el lingvoj, kiel la hispana, kie tiu rimo tute hejmiĝas. Alie la tradukinto ja estus malfidela al la originala romano. Cetere la rigora sinsekvo de kvartrokeoj, asociita al alternaj samaj asonancoj tra la tuta strofo, pli ol sufiĉe certigas la poeziecon.

Antonio Machado, same kiel, ĉiflanke de Atlantiko, José Hernandez en "Martín Fierro", majstre redonis la stilon de la popola rakont-arto, diskongita tie de la rapsodoj kaj ĉi tie de la kantistoj. Unu el la temoj, kiuj ĉefe vekadis la intereson de la vilaĝaj aŭdantaroj de tiuj vojaĝantaj artistoj, estis iu murdo, kaj unu el tiuj rakontoj Machado vestis per sia alta poezio, al kiu ne mankas lirikismo en la priskribo de la naturo kaj eĉ moralinstruo, ke "krimo ne estas kompensa".

Unu plia legindaĵo el la riĉa, sed malmulte tradukita ibera kaj iber-amerika literaturo.

Mendu ĉe UEA: 2,50 gld. + sendokostoj 10 %.

Laste aperis...

du katalogoj: "Eldonaĵoj de Amo-Akademio" (8 p.) kaj "Religia literaturo en Esperanto" (Karl-Olof Sandgren, 35 p. mimeogr.). Tro nova por aperi en tiu lasta estas la Nova Testamento laŭ S-ta Mateo en eldono de Internacia Katolika Informejo (168 p., 8,70 gld.).

El Riga aperis ankoraŭ unu ofsetita broŝuro: "En la frata familio de sovetaj popoloj". La reeldono de la bone konata verko de Faulhaber "Ne tiel, sed tiel ĉi!" koincidas ĉi-monate kun alia stila studo: "Zamenhofa stilo kaj moderna stilo" de akademiano T. Nakamura (14 p.). "Ett problem och ett förslag till lösning" estas la titolo de bonimpresa inform-broŝuro de SEF.

Anton A. Leenhard debutas libroforme kiel poeto per sonetaro "Somera simfonio" (27 p., ilus.). Sur biografia kampo aperis nova fotorepreso de la konata "Zamenhof" de E. Drezen (orig. 1929, 49 p.) kaj broŝureto "Profetino Helena Konttinen (1871-1916)" de K. K. Sarlin.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Nederlandaj mendantoj bonvolu aldoni por libroj 4 % kaj por diskoj k.a. 12 % pro impostoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

zaĵo por suferantoj de neinfekta haŭt-malsano konstatis, ke la eksperimenta uzo de Esperanto rezultigis 32 utilajn respondojn el 16 landoj ĝis la 18a de aprilo 1970. La asocio taksas tiun rezulton tre valora.

Pedagogio


- En la ombro de la pinarboj de Primošten okazos seminario por pedagogoj de la 8a ĝis la 25a de julio. Organizas Kroatia Esperanto-Ligo, P.f. 213, Zagreb, Jugoslavio. Programo: kursoj, ekzameno, prelegoj.

PERSONE

Jáki

- D-ro Ferenc Jáki el Budapeŝto instruos Cseh-metode en la ĉi-jara somera universitato de Jyväskylä, Finnlando. La kurso daŭros de la 29a de junio ĝis la 3a de julio.

Survoje al la UK en Vieno, oni povas halti en la bela bavara urbo Augsburg, kies ero montriĝas en la apuda foto kaj kie okazos en 25-31 julio la 43-a kongreso de SAT. Gastoj estos kore bonvenaj. La programo enhavos prelegojn i.a. de profesoroj Lapenna, Neergaard, Waringhien kaj d-ro Bormann. Tuttaga ekskurso al bela alpa regiono, teatra vespero kaj tutsemajna Esperanto-ekspozicio okazos en la kadro de la kongreso. Oni invitas ankaŭ al infankongreseto kun aparta programo. (Informas la delegito de UEA por Augsburg.)



55a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1 - 8 aŭgusto 1970

Alta protektanto: Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo.

Konstanta adreso:

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aŭstra Vespero

Koncertan karakteron havos la unua parto de tiu ĉi kongreslanda programero en Vieno (komponaĵoj de Beethoven, Schubert, Mozart, Strauss k.a.). La dua parto gvidos la publikon tra la liglandoj de Aŭstrujo dance, kante kaj muzike: arbaraj ĉaskornoj, jodlo kaj finfine viena "schrammel"-muziko.

Kiun funkcion havas delegito de UEA?

Aparta kunveno de reprezentantoj de fakaj asocioj kune kun ĉef-delegitoj kaj delegitoj de UEA, inkluzive de la fakdelegitoj, pritraktos la demandojn ligitajn kun agado de fakaj asocioj en fakaj medioj kaj la funkcion de delegito de UEA. Koncernajn raportojn preparas prof. Ivo Lapenna kaj d-ro Victor Sadler.

Situo de malkaraj loĝejoj

Responde al multaj leteroj la Loĝiga Servo de 55-a UK anoncas, ke en relativa proksimeco de la kongresejo (Sofiensäle) troviĝas neniu malmultekosta konvena loĝejo. En plejmultaj kazoj oni antaŭvidu minimume 30-minutan veturadon per urbaj trafikiloj.

Manon Lescaut ne aperos en UK

Pro negativa decido de la ĉeĥa ministerio por kulturo, ne okazos la prezento de "Manon Lescaut" fare de Silezia Teatro dum la Teatraj Vesperoj de la 55-a UK. Anstataŭe, krom al la Bulgara Esperanto-Teatro (folkloro komedio de St. L. Kostov "La virina regno") la kongresanoj aplaudos al pola aktorino Karina Waskiewicz, kiu prilaboris humanan svedan dramon de Pär Lagerkvist "Sybilla". (Pri "Sybilla" vidu la bildon sur p. 90)

Nuligo de Antaŭkongreso

Kaŭze de kompleta silento kaj nerespondado al leteroj flanke de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko (adreso publikigita en la Dua Bulteno sur paĝo 11), la organizantoj de la 55-a UK deklaras sin nerespondecaj pro eventuala malsukceso de la aranĝo. Samtempe la Estraro de UEA konsideras nuligon de la oficiala aŭspicio de la Antaŭkongreso pro la sama motivo.

Statistiko (31.5.1970)

Entute 1674 aliĝintoj el 44 landoj.



Kiril Drajev

Esperanto - 35 jarojn en Radio

Rigardon en la Esperanto-sekcion de la redakcio de la bulgara ĉefurba radio-stacio ebligis jena datrevena intervjuo de sofiano Nik. Nikolov.

Laŭ la ŝtuparo de la impona domo de Radio Sofia mi atingis la lastan etaĝon kaj eniris ĉambron, sur kies pordo staris surskribo: "Fremdlingva Redaktejo". Sur kelkaj labortabloj tradukantoj kaj radio-parolantoj estis preparantaj la informajn bultenojn, kiujn Radio Sofia elsendos en la sama vespero. Mi adresis min al s-ro Kiril Drajev, redaktoro de la Esperanto-elsendoj, kaj petis lin pri konciza konversacio...

— Ekde kiu jaro — demandis mi — Radio Sofia uzas Esperanton en siaj disaŭdigoj, destinitaj por eksterlando?

— Ekde 1935. Post unu monato ni festos la 35-jaran jubileon de nia sukceso en la bulgara radio.

— Kiu estis la unua parolanto en 1935?

— Nia forpasinta samideano Belĉo Oktomvrijski, tiama sekretario de la Bulgara Esperanto-Asocio. Tamen tre baldaŭ konstanta radio-parolanto estiĝis s-ano Stefan Ganĉev. La 15-minutaj elsendoj estis regule okazantaj en ĉiu dua jaŭdo. De junio 1937 ĝis februaro 1942 la parolanto estis mi.

— Kia estis la karaktero de la tiamaĵ elsendoj?

— Ili estis kulturaj prelegoj, kies aŭtoro estis

la parolanto mem. Jen la titoloj de kelkaj el ili: Ivan Vazov — la patriarko de la bulgara literaturo; Hristo Botev — verva poeto kaj flamanta ribelanto; La monto Vitoŝa — objekto de turismo; Bulgarujo — la legomĝardeno de la Balkanoj k.a.

— Vi aludis pri jubileo. Ĉu la elsendoj en Esperanto daŭris seninterrompe ĝis nun?


— Bedaŭrinde ne. En la mezo de februaro 1942 Radio Sofia estis vizitita de la germana kulturataŝeo. Trafoliumante la programojn de la Radio, li eksciis pri elsendoj en Esperanto. "Ne", deklaris aŭtoritate kaj imperative la vizitanto, "vi devas tuj ĉesigi la uzon de Esperanto en tiel grava instanco." La saman vesperon, antaŭ mia prelego, mi estis avizita pri ĉesigo de niaj disaŭdigoj pro "sugesto de altaj aŭtoritatoj".

— Ĉu la trudita paŭzo longe daŭris?

— Sufiĉe longe. En julio 1956 Radio Sofia, konscia pri la grava rolo, kiun Esperanto povas ludi en la internacia propagando, denove enkondukis Esperanton en siajn programojn. La ĉiusemajnaj elsendoj okazas dimanĉe de la 20-a horo kaj 5 minutoj ĝis la 20-a horo kaj 30 minutoj laŭ horzono de Greenwich je mallongaj ondoj de 50,62 metroj aŭ 5920 kilocikloj. La elsendoj estas ripetataj la saman vesperon de la 23-a h. kaj 30 minutoj ĝis la 23 h. kaj 55 minutoj laŭ la sama horzono je mallongaj ondoj de 49,42 metroj kaj 31,38 m. aŭ 6070 kaj 9560 kilocikloj.

— Laŭ viaj informoj, en kiuj landoj la elsendoj estas bone aŭdeblaj?

— Se ni konsideras la leterojn, ricevitaĵojn de



TEJO-redaktoro:
Wim Jansen,
Röntgenstraat 32 A,
Vlaardingen,
Nederlando

GRAZ VOKAS VIN!

— Lastaj informoj pri la 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

La ĉeftemo de la proksimiĝanta TEJO-kongreso "junularo kaj lernejo" penetras en ĉiujn aspektojn de la kongreso, tiel en prelegojn kaj diskutojn, kiel ankaŭ en la pli leĝerajn programerojn, la konkursojn kaj la diversajn vesperojn.

Ĝis nun akceptis **prelegi** dum la 26-a IJK prof. I. Lapenna ("la rolo de UEA/TEJO en la moderna mondo" kaj partopreno en la podia diskutado pri "projektado de la estonteco kaj la lingva problemo") kaj d-ro I. Szerdahelyi ("lernejo - ĝisdata informejo?" kaj same partopreno en la foruma diskutado). Krome kontribuos la studentoj de d-ro Szerdahelyi aktive al la kongreso per referaĵoj. La 26-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO estas plej rekta kontribuo de nia mondorganizaĵo al la "Internacia Jaro por Edukado", kiel Unesko proklamis la jaron 1970. La rezultoj de la prelegoj kaj diskutoj estos transdonitaj al Unesko en presita formo.

Estos tri **konkursoj**: oratora, literatura kaj fota konkursoj. Jam tradicia ero de la TEJO-kongresoj estas la oratora konkurso. Ne estas diktitaj temoj, sed la oratoraĵo koncernu la temon de la kongreso

aŭ la Deklaracion de Tyresö. Validas similaj reguloj kiel por la oratora konkurso en la kadro de la Universala Kongreso. Partoprenantoj de la literatura konkurso sendu siajn originalaĵojn aŭ tradukaĵojn al la prezidanto de la LKK. La verkaĵojn oni prezentos dum la literatura vespero. Ili havu temon, kiu plejeble rilatu al la sufiĉe vasta temo de la kongreso. Ĵurio juĝos ilin kaj premiigos. Ankaŭ de la fotokonkurso la temo estas tiu de la kongreso mem aŭ de la Deklaracio de Tyresö. La fotojn aŭ diapozitivojn ĵurios la tuta kongresanaro.

Kiel anoncis la Unua Bulteno, la 26-a IJK enhavas tutan vicon da **"vesperoj"**. La Teatran Vesperon aranĝos la Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo de Zagreb. La Latinamerika Vespero estos kreita en kunlaboro kun Landaj Sekcioj de TEJO en la amerika kontinento. Tiu ĉi vespero celas montri la problemojn de tiu parto de la "tria mondo" kaj samtempe vidigi la belecon de lando kaj naturo, la homan vivoĝojon en muziko kaj dancado. La Literatura Vespero estas jam aludita; ĝin realigas ĉiuj literaturemaj kongresanoj per siaj verkaĵoj, muziko, lumbildoj, ktp. Absoluta novaĵo

Sofia

multaj landoj, ni povas diri, ke la aŭdebleco de niaj elsendoj estas bona ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj.

— Kia estas la enhavo de la nunaj elsendoj en Esperanto?

— Niaj elsendoj konsistas kutime el du prelegoj je diversaj temoj, preskaŭ ĉiam aktualaj. Ili finiĝas per muziko — klasika, populara aŭ folkloro. Per sia publicista enhavo ili respegulas la kulturan kaj la politikan vivon de nia socialisma lando.

— Ĉu la Esperanto-disaŭdigoj inkluzivas pri-Esperantajn informojn?

— Jes. Tre ofte ni havas la rubrikon "Kroniko de Esperanto". Per ĝi ni informas la eksterlandajn esperantistojn pri nia enlanda movado.

— Mi supozas, ke Radio Sofia, estante en kontakto kun siaj fidelaj aŭskultantoj, ofte ricevas gratul- aŭ dankleterojn. Kia estas ilia enhavo?

El sia paperujo s-ro Drajev eltiras kelkajn ricevitajn leterojn kaj diras:

— Jen, italo dankas pri la aktualaj elsendoj, germano faras al ni valorajn sugestojn kaj deziras havi gramatikon pri bulgara lingvo, anglo esprimas sian esperon pri oftigo de niaj elsendoj, kaj svedo manifestas intereson pri nia folkloro muziko.

— S-ro Drajev, el kiom da personoj konsistas la taĉmento de la Esperanto-redakcio?

— El tri: s-ino Stefka Hristova, s-ro Gorgi Dolapčiev...

— Kaj la tria estas vi, ĉu ne?

— Ĝuste.

Alvenis la momento de surbendigo. La triopo sin direktis al la studio de la radio, afable adiaŭante, kaj mi, kontenta pri la ĵus okazinta intervjuo, descendis returnen laŭ la sama ŝtuparo.

Nik. Nikolov

ALIAJ PROGRAMOJ

RADIO ROMA. 7-VI, Strato Margutta, centro de la artista vivo en Romo; 14-VI, La itala poeto Giacomo Leopardi; 21-VI, Sankta Klara, patronino de la radio-televido; 28-VI, Marmolada, la plej alta monto de la Dolomitoj. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La jenaj ondolongoj estas nun uzataj: 41.24 m. (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). La dissendoj okazos de 20.00 h. ĝis 20.20 h., kiel kutime.

SVISA RADIO prezentas sian kutiman programon kvin minutojn pli frue per la jenaj ondolongoj: lunde kaj merkrede je 12.15 per ondoj 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs), 13.94 m (21520 kcs), jaŭde kaj sabate je 21.45 per ondoj 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.60 m (11720 kcs), 25.28 m (11865 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 19.44 m (15430 kcs). La ondoj 48.66 m kaj 31.46 m estas direktataj al Eŭropo, la aliaj al Afriko.

EL BRAZILO, la stacio Radio Clube de Sorocaba dissendas ĉiudimanĉe novan programon, kiu entenas brazilajn kanzonojn en nacia lingvo kaj Esperanto, informojn pri internacia Esperanto-movado, paroladojn, intervjuojn. Ondolongo: 278 m (1080 kcs). Horo: de 11.00 ĝis 12.00. Respondeca direktoro: S-ro Silvestre Bego. La alia programo, lunde de 00.00 h. ĝis 01.00 h. daŭras. Nur loka aŭskultebleco.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largentier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

estas Subgrunda Vespero, en kiu ĉiu aktorino en speciala vestaĵo.

Pri ĉiuj aliaj kongresaj tradiciaĵoj kaj novaĵoj informas la sekretario de la LKK, Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrujo.



Graz

Urba areo: 127 km². Enloĝantoj: 257 000. Graz — dua urbo de Aŭstrujo laŭ grandeco — estas ĉefurbo kaj landa registarsidejo de Stirio kaj ekonomia, kultura kaj administra centro de suda Aŭstrujo. Graz kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas plenaj je historiaj sciindaĵoj.

Kotizoj por Graz ĝis la 15a de julio: kongresanoj ĝis 21-jaraj pagas US\$ 27 (se individua membro de UEA/TEJO) aŭ \$34 (aliaj); 22-25-jaraj pagas respektive \$30 aŭ \$39; pli aĝaj pagas respektive \$32 aŭ \$41.

LA DATO DE LA IJK

en Graz

ŝanĝiĝis de 8-15 aŭg. 1970 al

10-17 aŭg. 1970

Laŭ informo de la LKK de la 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, pro neantaŭkalkulita kaŭzo la dato estas ŝanĝita kiel supre menciite.

La programo de la kongreso restos la sama. La LKK petas al la kongresantoj, kiuj partoprenos ankaŭ al la 55-a UK en Vieno, tuj skribi al LKK en Graz, ĉu ili volas rezervigon de tranoktebleco en Vieno dum la noktoj de la 8-a kaj 9-a de aŭgusto.

(La adreson de la LKK oni vidu en la maldekstra kolumno de ĉi tiu paĝo.)

OFICIALA INFORMILO

N-ro 435, 1 majo 1970

PLIA PERANTO EN SUD-AMERIKO

Hodiaŭ en Kolombio UEA havas kernon de 12 membroj, kie ĝis antaŭ kelkaj jaroj estis nur unu. Por helpi al tiu nova grupo kaj por plivastigi ĝin, UEA ĵus nomis Peranton por Kolombio. Li estas advokato d-ro Miguel Pérez-González, jam delegito de UEA por la 2-miliona ĉefurbo Bogotá. La adreso: M. Pérez-González, Bogotá, carrera 15 No. 85-37 apartm. 201.

Kun aliĝintaj landaj asocioj en Argentino, Brazilo kaj Urugvajo, kaj kun Perantoj en Meksiko, Peruo, Kolombio kaj Venezuelo, UEA nun havas landajn oficejojn en 7 latin-amerikaj ŝtatoj.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de aŭgusto neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Alan Towsey, Tahmoor. **Brazilo:** R. Eduardo Lopes, Cruzeiro de Sul. **Finnlando:** Erkki Aulasmaa (VD), Imatra. **Francujo:** Suzanne Authier, Beziers; Frederik Spindler (FD), Cannes; Paul Champs, Mantes-la-Ville, Marcel Bosc, Rouen; Henri Amblard, Saint Etienne (FD). **F.R. Germanujo:** Heinrich Köhne (FD), Göttingen. **Hispanujo:** S. Mulas Gallego (FD), Gijon; A. Gamboa y Sánchez, Valladolid. **Svedujo:** Gunnel Fejde (FD), Jönköping; Gunnar Olsson (FD), Skövde; Charles Johansson, Norrköping. **Usono:** George Wuest (FD), Chicago.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1970)

Alĝerio: Alger. **Argentino:** Rafaela. **Belgujo,** Bruxelles (FD agrokulturo). **Brazilo:** Baje; Belo Horizonte (FD religio teozofia); Brasília (FD framaso-nismo); Caratinga (FD framasonismo); Juiz de Fora (D, FD instruado); Maceió; Monte Aprazível; Pon-

ANONCETOJ

Ferioj en Danlando. Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu semajnon (11-18.7.70) en la feria centro de Kosmo en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela dana naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-sekcio, Mariendalsvej 94-96, DK 2000 Kopenhago F, Danlando.

Sendu 50-200 pm. de Germanujo, Aŭstrujo, Svisujo aŭ Nederlando. Mi sendos pm. je la sama valoro de Svedujo, Finnlando, Norvegujo aŭ Danlando. Herbert Levi, Käxgöl 332, S-380 24 Paryd, Svedujo.

Lernantoj de Esperanto-kurso el Sarajevo, Jugoslavio, inter 17 kaj 20 j., deziras korespondi pri diversaj temoj kun geamikoj el la tuta mondo. Respondo certa. Adreso: Safet Kalajdzić (instruisto) Kamenica 17-a, Sarajevo, Jugoslavio.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Aamosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Foiro de Barcelono plenumas sian 50-an datrevenon. Krom la oficialajn afiŝojn en E-o, ĉi-jare oni eldonos broŝuron kun Esperanta teksto. Hispana Esperanto-Instituto petas al ĉiuj, kiuj ricevos la afiŝojn, bonvolu tuj skribi rekte al la Foiro dankante pro la sendo; kompanse ili ricevos la jubilean broŝuron.

Turistoj notu bone, ke Maria Elisa Caetano, antaŭe delegito en Ponta do Sol (Portugalujo), nun loĝas en Funchal (Bloco Residencial, Caixa 14, Estrada Monumental 244).

Esperanto-kurso de liceo Brown en Adroque, Argentino, deziras interkorespondi kun similaj kursoj en ĉiuj landoj. Skribu: Nother 756, Adroque, Prov. Buenos Aires.

Ĉiu aktiva esperantisto estas kore bonvena al interesa studsemajno pri Argumentado kaj Retoriko, okazonta en 4-11 julio en Wendelsberg (popola altlernejo apud Gotenburgo) kadre de unua Nordia Esperanto-Seminario. En la sama semajno aparta Simpozio rilate inter-gimnazian instruadon de Esperanto en po unu gimnazio en landoj de kvar diversaj lingvogrupoj. Vizitoj, interesaj ekskursoj ktp. Petu programon kun aliĝilo de "INTER — Agadgrupo por Esperanto", Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedujo.

Per pk. aŭ letero vi povas peti enkondukon de Esperanto en la tutmondan programon de Sveda Radio, precipe se vi loĝas en Jugoslavio, Israelo, Japanujo kaj Pollando. Proponu programon duonhoran ĉiusemajne kaj menciu preferatan temon. Referenco: "INTER - Agadgrupo por Esperanto". Jen la adreso: Radio de Svedujo, Eksterlanda Programo, S-105 10 Stokholmo, Svedujo.

Mi serĉas numerojn 14-16 de "La Pirato" kaj numerojn sept. 12 (96), 1931, kaj febr. 6 (102), 1933, de "La Nova Epoko". Mi rekompencos laŭdezire. László Somlai, Budapest 5, Bajcsy Zsilinszky út. 40, Hungarujo.



tes e Lacerda; Pôrto Alegre (FD skoltismo); Rio de Janeiro (FD instruado, kulturaj aferoj, religio protestantisma, ŝako); Sao Miguel Paulista, Sao Paulo (FD astronomio, kalkulsistemo); Vitória (FD edukado, lingvoj); Volta Redonda (D, FD kalkulado); Xapecó. **Britujo:** Dumbarton; Windsor. **Bulgarujo:** Ruse. **Ĉeĥoslovakujo:** Decin; Karlovy Vary, Kosice (FD religio, turismo); Lanzhot; Náchod; Plzen (FD trafiko); Strakonice. **Danlando:** Vallekilde. **Finnlando:** Lohja (D); Tampere (FD kooperativismo). **Francujo:** Beziers (D Salasc, FD filatelo); Bourg de Péage. **F.R. Germanujo:** Berlin (D). **Italujo:** Milano (FD fervojoj). **Nederlando:** Volendam. **Svedujo:** Tranas; Varberg (VD). **Usono:** Fayetteville.

MEMBRO-SUBTENANTO 1969

274 Rhie, s-ro D.-Y., Koreujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

217 Zeller, s-ro H., Aŭstrujo. 218 Boffejon, s-ro H.; 219 Jaumotte, s-ro M., Belgujo. 220 Farias, s-ro B. F.; 221 Nunes, s-ro E. P.; 222 Rabêlo, s-ro A.; 223 Sousa, d-ro F. R. de, Brazilo. 224 Choi, s-ro B.-Y.; 225 Choi, s-ro D.-S.; 226 Rhie, s-ro D.-Y., Koreujo. 227 Engen,

s-ro P., Norvegujo. 228 Lindström, s-ro B.; 229 Stenström, f-ino S., Svedujo. 230 Chobanoff, d-ro S.; 231 Harvey, d-ro G. W.; 232 Hornbeck, d-rino M.; 233 Williams, s-ro R. E., Usono.

DONACOI (Gld.)

Fondajo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Italujo: Minnaja, s-ro L., 50,—. Nederlando: Zeiler, s-ro F., 30,—.

Fondajo Oficeja Ilaro: (ĉiuj donacoj estas por la presejo): N.N., 10,40. Aŭstralio: Pollard, s-ino G., 23,33. Britujo: Colley, s-ro R., 8,55. F.R. Germanujo: Sonnabend, s-ro H., 19,80; Zilles, s-ro E., 10,—. Hispanujo: Serra Hernández, s-ro B., 6,86. Japanujo: Isiguro, s-ro T., 100,—. Nederlando: L.E.E.N., 500,—. Svisujo: Walder, s-ro O., 100,—. Usono: Docal, s-ro S., 16,28.

Ĝenerala Kaso: Francujo: Thierry, s-ro J., 5,—. Israelo: Alberg, s-ro R., 2,96. Nov-Zelando: Swift, s-ro F., 7,40.

Patrono A de TEJO: Britujo: Heath, s-ro J. Italujo: Minnaja, s-ro L.; Strozzi, f-ino C. Jugoslavio: Skaller-Race, s-ino V. Norvegujo: Madsen, s-ro L.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Francisko kaj Mikaelo ĝojas anonci la alvenon de Daniela Aminda en la verda familio Werme-linger, F-68-Buhl, Francujo.

Loĝdomo de Popola Alta Lernejo en Wendelsberg, proksima al la mondekonata havenurbo Gotenburgo, estas je dispono de Nordia Esperanto-Seminario, okazonta en 4-11 julio. (Vidu maldekstre sub "Ĉiu aktiva esperantisto".)



Vegetaranoj! Mi siatempe promesis al s-ano Ĥavkin, transpreni la gvidadon kaj reeldonon de "Vegetarano", organo de Tutmonda Vegetarana Asocio (TEVA). Tiun promeson mi devas plenumi, tio ja estas eĉ devo de eks-skolto. Bonvolu anonci vian adreson al: Ernesto Vana, Dudince (Zvolen) Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

Vizitu Cullera (Valencia), Hispanujo. Ripozu trankvile kelkajn tagojn en tiu ĉi belega urbeto, ĉarma anguleto de Mediteranea maro. Monto, malnovaj kasteloj, monaĥejo, lumturo, rivero Júcar, longa marbordo kaj milda vetero la tutan jaron. Senpagaj informoj pri loĝado en ĉiuj kategorioj, aĉetado de apartamentoj kaj mebloj, ktp. Skribu al samideano Jozefo Lopez, Apartado 29, Telef. no. 323, Cullera (Valencia), Hispanujo. Bonvolu sendi respondkuponon kaj ankaŭ ilustritan bildkarton por ekspozicio en nova esperantista oficejo.

D-8640 Kronach (Germanujo), la naskiĝurbo de la mondekonata pentristo Lucas Cranach, festos en somero 1972 la 500-an datrevenon de la granda majstro. Por la festoparolado en Esperanto ni bezonas kompetentan preleganton (plej volonte eksterlandanon), kiu senkoste restos en nia beleta urbo. Proponoj, konsiloj kaj ĉiuspecaj spertoj, iel aplikeblaj por la preparo de la festo, estos danke akceptataj. Bonvolu skribi al la loka delegito de UEA.

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

En 1970 aperos:

ABZ de Amo

de la danaj verkistoj Inge & Sten Hegeler.
La plej vendata libro de sia speco en Danlando — enciklopedio pri la kunvivo de plenkreskaj homoj — verkita por plenkreskaj homoj. Petu senpagan prospekton ĉe la eldonejo. Reduktita prezo je antaŭmendo.



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando

VIA

Apud MEDITERANEO

1-15 julio

KOMUNA RENKONTO

Skribu al: Lentaigne, 3, Gaillarde, F-34-Montpellier, Francujo.

Esperantista Kampadejo

Ĵus fondita eksport- kaj importfirmao

serĉas komercajn kontaktojn ĉie en la mondo. Nin interesas ĉiuj produktoj, kiuj vendblas en Finnlando. Ni ofertas finnajn produktojn. Por la organizado ni atendas leterojn de ĉiuj, kiujn la afero interesas. En la korespondo ni uzas nur Esperanton.

NORDO

— eksport-importa agentejo
Siltakatu 1 A 13, HEINOLA, Finnlando

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

moderna internacia revuo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri mondvastaj edukaj kaj klerigaj problemoj

Formato 16,5 x 24 cm, 28 paĝoj, belaspekta kovrilo. Aperas trifoje po jare

Abonprezo 6 GM, provnumero 2 GM aŭ 4 internaciaj respondkuponoj

Mendu ĉe Ludwig Pickel, eldonejo

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 2, Germanujo

Pčk. Nürnberg 819 56

La plej evoluinta lingvaĵo
la plej freŝaj sciigoj
la plej larĝa panoramo de la Esperanto-movado
la plej bona ripozo por la esperantisto

— unuvorte —

ESPERANTO-DISAŬDIGOJ DE LA POLA RADIO

ĉiutage kaj senpage

Ekde majo ĝis novembro 1970 ili estas aŭskulteblaj je la horoj:

6.30 — sur la ondoj: 200 kaj 31, 41 kaj 49 metroj

16.30 — sur la ondoj: 31 kaj 41 metroj.

En la Esperanto-programoj de la Pola Radio enestas: landaj kaj mondaj novaĵoj, aktualaj komentarioj, sociaj, ekonomiaj, sciencaj kaj kulturaj temoj, turismaj kaj landkonigaj eroj, virinaj, junularaj kaj sportaj temoj.

Same abunde kaj diversmaniere prezentiĝas la Esperanto-temaro. La dimanĉlunda "Esperanto-Ekspreso", sed ankaŭ la dumsemajnaj — "Leterkesto", "Koncerto kun bondeziroj", "El la vivo de Pola Esperanto-Asocio", felietonoj, gazet-trarigardoj, rubrikoj por komencantoj kaj aliaj.

Tre rekomendindaj estas ankaŭ Esperanto-anguletoj kadre de la german-, svedkaj danlingvaj disaŭdigoj de la Pola Radio.

Pliajn detalojn vi povas ekscii laŭ senpage ricevebla kolora informilo. Sufiĉas skribi al la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, poŝtkesto 46, Varsovio-1, Pollando.

LA MODERNA HOMO NE POVAS VIVI SEN LA INFORMADO.
AL LA MODERNA ESPERANTISTO LA INFORMOJN DONAS

POLA RADIO